# *E*speranto-*N*umismatika *A*socio



**Esperanta Numismatiko** 2023 **Jarkolekto 10 - Numero 4**





-

# *E N H A V O T A B E L O*

## de oktobro 2023


Titolpaĝo: ……………………………………………………….……....  1

Enhavotabelo ……………………………………………………..  2

De ni por … ni! …………………………………………….........  3

Moneroj & medaloj ……………………………………..……....  4

*7a Hispana nacia kongreso en Sevilla 1928*

*La diplomato kiu bojkotis Esperanton*

*Charlie Chaplin (1889 - 1977)*

*78a Universala Kongreso de Esperanto 1993*

Spikumaĵoj & suplementoj: Kompletigaj novaĵoj pri enigma medalo (1912).  9

Por spuremuloj! …………………………………………………..  10

Aspektoj de numismatiko: Kiel muldi medalojn en gipsmuldaĵon ..….  11

La granda kvizo pri la spesmilo ……………………………………  13

Valormarkoj & valorbiletoj: Trajna vojaĝbileto por la 10a UK en Parizo ….  15

Historiaj aspektoj: La Premio Klara Silbernik ……………….………  16

Terminaro: alfabeta listo (35) ………………………………........  18

Numismatika forumo: Rakonto pri tri duonkronoj ……….….….……  19

El la gazetaro …………………………………………….….……  22

Retpoŝto ………………………………………………………..  23

Anoncoj & eventoj ……………………………………..…………  29


***Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)***


Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: http://ena.frali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

# *DE NI POR ... NI!*

*Mono fluas al riĉulo,*
*batoj al malriĉulo.*
*(Zamenhofa proverbaro)*

Ĉi enkonduko de la kvara numero de nia deka, jubilea jarkolekto enfokusigas intencege kaj emfazege la nemalhaveblan laboradon de diversaj virinoj en la vasta mondo, kiuj ege klare kaj laŭdinde kolorigis kaj kolorigas la historion de nia movado.

La kaŭzo de jena iom acida rukto estas la konstato, ke en la Esperanto-numismatiko pasintece apenaŭ kelkaj medaloj estis dediĉitaj al altmeritaj esperantaninoj. Kaj se oni hazarde trovas indikon al porvirina medalo, tre ofte la artaĵo mem estas preskaŭ netrovebla kaj nur rarege estas montrata foto en iu ajn esperanta gazeto aŭ revuo.

Tial nia karmemora pioniro Hans Jankowski en unu el liaj broŝuroj devis montri manfaritan kaj malklaran kopion de grava medalo, dediĉita malrekte al Klara Silbernik.Tiu tamen grandformata medalo celis funkcii-ĉiun jaron ekde 1975-kiel premio por edzinoj de esperantistoj, *"kiuj abnegacie*(!) *helpis sian edzon"* en liaj penadoj favore al Esperanto.

Tiu premio (nur en la dek-okaj jaroj "pliriĉigita" per atesto) estis estigita en Barcelono kaj inter 1975 (okaze de la Internacia Jaro de Virinoj) kaj 2002 27-foje enmanigita al t.n. meritplenaj edzinoj. Foton de la medalo mem ni ĝis hodiaŭ vane serĉis en la reto!

La reagoj koncerne tiun premion ne estis nepre pozitivaj… Protestis ne nur virinoj mem, sed eĉ viro: Jorge Camacho! La pli grava plendmotivo estis, ke la edzinoj nur estis menciitaj kiel helpintoj de la edzoj. Do, la vere premiita persono estis denove… viro!

Tamen en la historio de Esperanto estas sufiĉe da "grandaj damoj", kiuj mem kaj sendepende,eĉ sen iu (esperantista) edzo, kontribuis al la konstruado de la vojo al la estonteco de Esperanto. Nur kelkjan nomojn de rajtantinoj ĉi-sube, sed certe ekzistas multe pli el ili, por instigi niajn esperantajn internaciajn, naciajn kaj lokajn asociojn, por finfine honori ilin per honora medalo: **Lidia Zamenhof, Marjorie Boulton, Anna Löwenstein, Verda Majo, Marie Hankel, Lina Gabrielli, Spomenka Štimec, Paula Mährti, Júlia Sigmond, Eli Urbanová, Despina Patrinu, Elda Dörfler, Ana Manero**……..**kaj multaj aliaj**!

Nemirinde, ke ni celas nun instigi vin, karajn legant(in)ojn, legi la artikolon en ĉi numero pri la **Premio Klara Silbernik** en la rubriko "Historiaj Aspektoj".

Evidente, en la kvara numero estas ankoraŭ diversaj aliaj interesaj kaj legindaj artikoloj en la kutimaj rubrikoj pri aspektoj de la esperantanumismatiko, kiuj rolos senĉese kaj denove en la estonta, dek-unua jarkolekto de "Esperanta Numismatiko" venontan jaron.

Al nia fidela legantaro ni deziras agrablan kaj pliriĉigan legadon kaj scivolemon koncerne la unuan numeron de la dek-unua jarkolekto, fine de januaro 2024!

Bert

## Tipo A 3 – Esperantaj medaloj kun ne-esperantaj aldonoj

7a Hispana nacia kongreso en Sevilla 1928





Lando: Hispanio
Metalo: kupro-nikelo
Mezuroj: 19,5 mm x 25 mm
Jaro: 1928

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 4,35 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: 1 mm

### *Averso:*

ĉirkaŭe: rando, en kiun partoj (turetoj) de la bildo eniras. Krome surskribo:

"7° CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO SEVILLA"

fone: kvin pintoj de sufiĉe granda Esperanto-stelo, kovrita post la medalo

meze-supre: vidaĵo de kvartalo de la urbo

meze-sube: "malstabile" skizita ponto. Surskribo: "5-9 / NOVBRE / 1928 inter la du pilieroj de la ponto

### *Rimarko 1:*

sur la supra pinto de la nevidebla stelo estas pendigileto nur sufiĉe larĝa por rubandeto kun nefermiga "okuleto"

### *Rimarko2:*

NOVBRE = **novembre**

### *Rimarko 3:*

centra bildo kun la Triana-ponto



## Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

La diplomato kiu bojkotis Esperanton






| | |
|---|---|
| Lando: Francio | Kvanto: *serĉata* |
| Metalo: bronzo | Pezo: 152 g |
| Diametro: 68 mm | Medalisto: Pierre Turin |
| Jaro: 1933 | Diko: *serĉata* |

### *Averso:*

busto de Gabriel Hanotaux, maldekstren

sube: “P. TURIN / MCMXXXIII” (= 1933)

### *Reverso:*

“GABRIEL HANOTAUX ANCIEN MINISTRE DES AFFAIRES ETRANGERS MEMBRE DE L’ACADEMIE FRANÇAISE ANNO AETATIS LXXX” (= Gabriel Hanotaux, eksministro pri eksterlandaj aferoj, membro de la Franca Akademio, aĝo 80-jara)

### *Rimarko 1:*

Hanotaux, deligito franca en la Ligo de Nacioj (1920-1923) **necedigeble kontraŭstaris la proponon enkonduki Esperanton kiel novan laborlingvon de la Ligo!**

### *Rimarko 2:*

Gabriel Albert Auguste Hanotaux, diplomato, historiisto kaj politikisto (Beaurevoir 1853-Parizo 1944), ricevis la supran honoran medalon okaze de lia 80a naskiĝdatreveno.




*En la epoko antaŭ la dua mondmilito tiamaj faŝistaj landoj kiel Germanio, Italio, Hispanio k.a. demonecigis Esperanton kaj ĝian kulturon. La nazioj nomis Esperanton bolŝevista. En sia "Mein Kampf" (= mia batalo) Hitler indikas la internacian lingvon kiel ekzemplon de lingvo preparita por esti uzota en la tuta mondo, iam konkerota de la judoj. Tial kaj tiel esperantanoj iĝis parto de Holokaŭsto.*

*Diversaj zamenhofidoj kaj aliaj judoj estis deportitaj al diversaj koncentrejoj. Ekzemple Lidia Zamenhof estis kaptita en Varsovio kaj deportita okaze de la t.n. "Grossaktion Warschau" (= la "ordigo" de la geto) al Treblinka kaj tie murdita en 1942.*







*Bibliografio:*

*Ulrich Linz: "La danĝera lingvo / Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto" Bleicher Eldonejo, 1988*

## Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Charlie Chaplin (1889-1977)





| | |
|---|---|
| Lando: Usono | Kvanto: *serĉata* |
| Metalo: bronzo | Pezo: 212 g |
| Diametro: 71 mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 1974 | Diko: *serĉata* |

### *Averso:*

meze: fronta bildo de la vizaĝo (kun tipaj nigraj hararo, lipharoj …) de la persona tipo, kiun Karlo Ĉeplino figuris en siaj komikaj filmoj

sube-flanke: kvazaŭ engravuritaj literoj de la angla nomo “Charlie Chaplin”

### *Reverso:*

La figuro el la filmoj, la malheroa vagabondo, kiel en komiksoj, kun la tipaj tuka manĝujo, bulĉapelo kaj rotanga bastono, survoje al nova aventuro, dum la suno subiras kaj indikas la finon de la antaŭa aventuro

### *Rimarko:*

Chaplin aktoris i.a. en la filmo “The Great Dictator” (La granda diktatoro, 1940), en kiu li figuris Adolf Hitler. Majstra kritikilo, en kiu Hitlero estas prezentata kiel monstra, nazia krimulo, nomata Hynkel [hinkel]. En tiu filmo diversaj stratŝildoj montras esperantlingvajn vortojn, per kiuj Chaplin primokas la nazian kulturon, uzante karikature kvazaŭprusan lingvon kaj proteste la lingvon, kiun Hitler demonigis.

## Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

78a Universala Kongreso de Esperanto 1993




| | |
|---|---|
| Lando: Hispanio | Kvanto: *serĉata* |
| Substancoj: kupro kaj ligno | Pezo: 200 g |
| Diametro: 145 mm (ligna disko) | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 1993 | Diko: 15 mm |

***Averso:*** *(unuflanka medalo)*

ĉirkaŭe: surskribo en reliefo: “78a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO”

meze: antikva urbopordego: “Torres de Serranos”

sube: “VALENCIO HISPANIO 24-31 JULIO 1993”

### *Rimarko 1:*

la murmedalo havas pendoŝnuron kaj konsistas el kupra disketo fiksita sur ligna disko

### *Rimarko 2:*

la antikva pordego Torres de Serranos



# *S P I K U M A Ĵ O J & S U P L E M E N T O J*

## Kompletigaj novaĵoj pri enigma medalo el 1912




En la antaŭa numero, en la rubriko "Medalistoj", ni fokusis Raoul-Eugène Lamourdedieu, la medaliston de unu el la pli malnovaj kaj enigmaj medaloj de la esperanta numismatiko.

Poste, antaŭ nelonge ni hazarde trovis aŭkcian anoncon, kiu, nur menciante diametron de 120 mm, montras du variantojn (*maldekstre k. meze*) de la sama medalo, tamen sen iu bildo de reverso. Do, tre probable jen unuflankaj medaloj, tiel nomataj plaketoj aŭ murmedaloj, ekz. por iama monumento, ene aŭ ekstere. Sekve ni trovis eĉ averson de arĝent(it)a ekzemplero (*dekstre*)!

Unu el ili, laŭaspekte estis farita en bronzo, la alia en latuno. La bronza klare estas la sama varianto kiel la plaketo (havanta reverse klarajn spurojn de aplikado) en la antaŭa numero de nia revuo (vidu jen sube):





De la latuna kaj la arĝenta ekzempleroj ni do havas nur bildon de la averso. Tamen estas preskaŭ certe, ke ankaŭ ili estis uzitaj aŭ uzeblaj kiel plaketo aŭ murmedalo. Tio kvazaŭ certe indikas la saman funkcion kiel la bronza (*supre*).

La tri plaketoj krome montras nur la nomon de "D$^{RO}$ ZAMENHOF" kaj la subskribon de la medalisto (Lamourdedieu).

Vidu ankaŭ: jk.10, n-ro 3, p.18 / Komparu!

## *P O R   S P U R E M U L O J !*
## Kiu el vi (re)konas tiujn numismatikaĵojn?

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.*

**XXIXa enigmo** **?**




29a Sat Kongreso Beograd 24 - 30 VII 1956

**XXXa enigmo** **?**



# *A S P E K T O J   D E   N U M I S M A T I K O*

## Kiel muldi medalojn en gipsmuldaĵon

### Enkonduko

*Konstatis tre lerta belga numismato, Luc Vandamme, ke la famega belga medalisto Armand Bonnetain foje muldigis medalojn,kiuj jam ekzistis en identaj stampitaj versioj. Lia filozofio tiurilate estis, ke stampitaj medaloj estas kvazaŭ "mortstampitaj", dum mulditaj ekzempleroj estis pli "vivantaj", pli kontrastriĉaj kaj pli efike povas esti patinigataj kaj tamen aspektas same glataj, kondiĉe ke la alojo estas sufiĉe likva, sendepende de la konsisto de la alojo. Tiel Luc decidis kompari la du specojn kaj klarigi, kiamaniere medalo povas esti muldata laŭ la tekniko de Bonnetain.*

Medalo kreita de Armand Bonnetain





stampita




muldita


### Preparado de la gipso (fig.1)





Por fari muldaĵon, oni prefere uzu freŝan gipson, tre fajne muelitan. La preferata gipso estas tia, kian uzas dentistoj. La sekvanta paŝo estas miksi la gipson kun akvo, ĝis kompleta saturiĝo. Sekve oni delikate kirlu la tuton per spatelo, skuu la enhavon por forigi la bobelojn kaj malaperigu ilin per la spatelo. Poste verŝu iom da likva gipso sur la modelon kaj per malseka broseto malaperigu la eventualajn bobelojn. Fine verŝu la ceteran gipson, ĝis la muldaĵo fariĝas kompleta.


**Preparado de la muldaĵo**

La objekto, medalo aŭ plaketo estu oleata kaj metata sur ebenan, glatan bazon, same oleitan singarde. La modelo (stampita aŭ gipsa medalo) estas ĉirkaŭigata per kadro (C) el sufiĉe forta kartono aŭ plumbo. En ĝin oni verŝu la gipson, kiel supre klarigite. Lasu la gipson malfluiĝi. Venontan tagon la tuto estu turnata kaj la medalo kaj la gipso estu ŝmirataj per sapŝaŭmo. Sekve en la gipson oni faru kelkajn konusajn truetojn (D), por poste perfekte konekti la du gipsajn muldaĵojn (fig.2/3). Poste denove verŝu tavoleton da gipso same dike kiel la unua, en novan, duan kadron (C). La venontan tagon oni disigu singarde la muldaĵojn per maldika tranĉilo. Post la disigo oni forprenu la modelon kaj sekigu la du muldaĵojn en sufiĉe varma forno.



Post kompleta sekigo oni faru la muldokanaletojn (A, B, C) en la gipson tre proksime de la kaveto de la modelo, kaj same en ambaŭ muldaĵoj. La muldokanaleto ambaŭflanke estu duone elipsa kaj iom pli vasta super la kaveto de la modelilo. Tiu parto devas ricevi pli da metalo, necesa por muldi la medalon mem. Se ne, la artefakto ne havus necesan delikatecon kaj eble ekiĝus kristala strukturo kaj eĉ kavetoj. Sekve do oni konstruu la muldokanalon, la vastan parton kaj la aerkanalojn. Tiuj lastaj nur en unu muldaĵo kiel montrata (fig.4).




Antaŭ la rekunigo de la muldaĵoj oni pudru ambaŭ per talko aŭ ege fajna plumbopudro kaj malaperigu per delikata broseto la troaĵojn. La kunigitaj muldaĵoj estu metataj vertikale en vajcon, kun la aperturo de la muldkanalo supren. Sekve varmigetu la muldaĵojn kaj rapide enverŝu la alojon. Reaperigu la muldaĵojn post kvin ĝis dek minutoj. Fine malaperigu la muldon kaj la aerkanaletojn, krome la tranĉrandajn, malglatajn kromeĝojn.

Originala teksto en la franca: Armand Bonnetain
Ennederlandigis: Luc Vandamme
Esperantigis: Bert Boon
Fonto: “Flash Medailles” jk. 26, n-ro 23277

## *LA GRANDA KVIZO PRI LA SPESMILO* ***(NIA INTERNACIA MONO)***

*La spesmilo difiniĝas per certa pezo da oro. Je kiu fajneco ?*

**a. 19-karata b. 22-karata c. 0.999-karata**

*Laŭ la difino, kiun pezon da oro de specifita fajneco 10 spesmiloj egalas?*

**a. 7 gramojn b. 8 gramojn c. 10 gramojn**

*kiom da spesoj egalus 1 gramo da **pura** oro?*

**a. 1250 b.1363,6 c. 1001**

*Se ekzistus 1 spesmila monero el oro, kiom da gramoj da pura oro ĝi entenus?*

**a. 0,7333 b. 0,7322 c. 0,8000**

*Kial tiu fikcia monero ne praktike uzeblas en kongresoj?*

**a. ĝi estus tro malgranda b. ĝi estus tro valora por malgrandaj aĉetoj**

*Kiel nomiĝas en Esperanto la ĉiujare stampata brita monero, kiu laŭ ora enhavo estas efektive 10-spesmila monero?*

Enmetu la mankantajn literojn **V***NO

*Se oni kalkulas precize, kiom da spesmiloj valoras la brita suverena monero?*

**a. 9.985 Sm b. 10.0012 Sm c. 9.895 Sm**

*Ĉu or-enhavaj moneroj de kiu ajn lando havas kalkuleblan valoron en spesmiloj ?*

**a. Jes, kaj fiksitan b. Ne c. Jes, sed varias.**

*Por rapide determini la valoron de la spesmilo en kiu ajn valuto, per kiu facile memorebla numero oni dividas la prezon de oro (fajn-unco) **en tiu valuto**?*

**a. 42,42 b. 24,24 c. 34,34**

*Kiom proksimume estas la aktuala or-arĝenta kvociento (uncoj da arĝento samvalora a1 unco da oro)?*

**a. 78 b. 55 c. 15**

*Por kalkuli,* ***en spesoj*** *la valoron de arĝent-*enhava *monero, unue oni kalkulas la pezon de la entenata arĝento:*(G*F); *due oni konvertas tiun pezon al samvalora pezo de pura oro:* (G*F)/Kv; *trie oni multiplikas tiun lastan pezon per la valoro* ***en spesoj*** *de 1 gramo da pura oro: Sp(G*F)/Kv.Kiu estus la ĝusta formulo por Sp?*

**a. (24/22)/8  b. 1000*(22/24)/8  c. 10000*(24/22)/8**

*De 1920 ĝis 1946 (ink.) kiun procentaĵon da arĝento* entenis *la britaj arĝentaj moneroj (duonkrono, florino, ŝilingo ktp.)?*

**a. 83%  b. 0%  c. 50%**

*La britaj arĝentaj moneroj de la periodo supre menciita havis fiksan pezan rilaton inter si, tiel ke se oni scias la aktualan ekvivalentan valoron en spesoj de unu el tiuj, oni tuj scias la valoron de tiuj de alia nominala valoro. Do se la duonkrono (ekz.) taŭgus kiel 100-spesa monero, por kiu sumo en spesoj bonus la sespenco?*

***a. 30  b. 24  c. 20***

*Sed kion fari por tre malgrandaj sumoj? Feliĉe la britaj kupraj moneroj de antaŭ 1992 estis stampitaj el bronzo kun 97% kupra enhavo, kaj tiuj havas signifan valoron laŭ la metala enhavo. Tiu valoro en spesoj estas kalkulebla en simila maniero kiel por arĝent-*enhavaj *moneroj sed uzante (ĉi-okaze) la or-kupran kvocienton. Aktuale, laŭ la kupra enhavo, la brita (bronza) 2-penca monero valoras ĉ. 5 britajn pencojn. Tio estas kiom en spesoj ?*

**a. pli ol unu speso  b. malpli ol unu speso**

*OPINI-SONDO*

*Kio, laŭ vi, estas la plej granda obstaklo por la uzo de arĝent-*enhavaj *moneroj kiel spesmil-ekvivalenta mono en kongresoj?*

a. manko de tiaj moneroj (sufiĉe malaltvaloraj por malgrandaj aĉetoj); b . tiaj moneroj ne estas haveblaj kun la arĝent-enhava valoro; c. E-organizaĵoj ne kvotas siajn varoj aŭ servojn en spesmiloj; ĉ. la or-arĝenta kvociento estas tro malstabila dum la tipa daŭro de E-kunvenoj, por kalkuli la spesmilan valoron; d. akirinte arĝent-enhavan moneron, neniu volus ĝin elspezi pro la probabla estonta kresko en la valoro de arĝento.

***Ni dankas nian Terry Watts pro la interesa kvizo! La solvoj aperos en la sekvonta numero…***

# Trajna vojaĝbileto por la 10a Universala Kongreso en Parizo



**Sonderfahrt zum 10. Esperanto-Weltkongresse in Paris.**

**Eger-Paris und zurück.**

Karte Nr. 165 Klasse III

Herr ~~Frau~~ Tamme

in Esslingen

bezahlte 122 M ~~K——h~~ und ist berechtigt, am ganzen Unternehmen teilzunehmen. Bietigheim-Paris u. zurück.

Gegen Vorzeigung dieser Karte erfolgt Abgabe der Fahrt- und sonstigen Ausweise.

**Verein deutscher Esperantisten.**

Obmann.

Jen tre rara kaj historie grava dokumento. Ĝi estis porokaza vojaĝbileto (ire kaj revene) por la partoprenontoj de la "Verein deutscher Esperantisten" (Asocio de Germanaj Esperantistoj) en kunlaboro kun la Germana Fervoja Kompanio.

La speciala vagonaro ekvojaĝis el la hungara urbo Eger kaj diversloke venis por akompani kongresmembrojn, i.a. nian s-ron Tamme (el Eslingeno en Germanio) en la stacidomo de Bitighejmo (Sud-Germanio). La bileto ankaŭ havigis al la vojaĝanta esperantisto la necesajn oficialajn dokumentojn ("Ausweise"); la sumo de 122 M (= germanaj markoj), krome sufiĉis verŝajne por la kompleta evento (kongreso, vojaĝo, dokumentoj…), en la germana "berechtigt am ganzen Unternehmen teilzunehmen".



La karto estis sendita el Hungario, (sur la poŝtmarko videblas stampo de Eger!) la monunuo "Heller" estis tiam oficiala en diversaj landoj en Eŭropo, ankaŭ en Hungario).

Tiu malbonŝanca partoprenanto (kajmultaj aliaj, kiel la familio Zamenhof) tamen devis baldaŭ kaj rapidege reirial la pariza stacidomo pro la eksplodo de la unua mondmilito (1914)!

Rimarko de Jozefo Horvath: *"Pri Eger: mi konjektas, ja certe ne scias, ke temas pri la ĉeĥa urbo Cheb, kun germana nomo Eger. La alparolo kaj la surskribo estas germanaj. En la hungara Eger neniam ekzistis Verein Deutscher Esperantisten. Kaj kiel vi scias, tiutempe Ĉeĥio apartenis al la Aŭstrio-Hungario, kaj en Ĉeĥio loĝis multaj germanoj. Kvankam troviĝas ankaŭ en Hungario urbo Eger, sed kun hungara loĝantaro. Krome la poŝtmarko havas germanan surskribon, la hungariaj poŝtmarkoj havis ankaŭ tiutempe hungaran surskribon. Krome Heller neniam estis hungara monero, ĝia hungara ekvivalento estas fillér.*
*Do verŝajne temas pri la ĉeĥia Eger, nuntempe Cheb."*


## *H I S T O R I A J   A S P E K T O J*

# La Premio Klara Silbernik



Supozu, ke vi vin demandus, kiu vere estis tiu Klara Silbernik… Verŝajne vi prenus el via biblioteko vian ekzempleron de la famega “Enciklopedio de Esperanto” (1937), fidante trovi ampleksan artikolon pri tiu grava kaj granda damo en la historio de la Internacia Lingvo. Vane, vane … kaj mirigite, vi konstatus, ke tiu aserto indikas du personojn kun la nomo “Silbernik”, nome, Aleksandron, la bopatron de Ludoviko, kiu ebligis al sia bofilo eldoni la unuajn broŝurojn pri Esperanto kaj kiu dum 15 jaroj monhelpis lin realigi la projekton de Esperanto. Aliflanke la apenaŭ konatan Jozefon, bofraton de Zamenhof, usonanon, kiu estis longtempe ĉefdeligito de UEA en Novjorko. Pri la ege bone konata Klara SILBERNIK: nenion! Nu, en tiu epoko viroj ĝenerale ne estis anoj de la nova inismo, kvankam Ludoviko en letero al Emile Javal de la 10a de julio 1905 deklaras pri Klara: “Mia edzino plej fidele kaj plej sindone partoprenis en ĉiuj suferoj kaj malagrablaĵoj, kiujn Esperanto donis en la unuaj jaroj.”

Historie logika pripensado direktus nin eble al la aserto: “Klara ZAMENHOF” kaj… tie en la enciklopedio vi fine trovus ege mallongan artikoleton pri Klara … SILBERNIK! (foje skribita “Zilbernik”).



**Zamenhof** Klara, edzino de Z. Nask. kiel f-ino Silbernik 6 okt. 1863 en Kowno, mortis 6 dec. 1924 en Varsovio. Senhezite fordonis sian tutan doton por la eldono de la Unua broŝuro, 1887. Estis ĉiama kunlaboranto kaj helpanto de la edzo, ofte plenumis liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn. Ankaŭ post la morto de Z aktive partoprenis la movadon. Dank' al ŝia kunhelpo, fondiĝis la E Rondo »Konkordo« en V. Ĉeestis ĉiujn UK ĝis la Viena 1924, kiu estis ŝia lasta renkontiĝo kun la E-istaro. E. W.



Post la morto de Ludoviko ŝi tre aktive kontribuis al la disigado de la Esperanto-projekto kaj entuziasme subtenis la filinon Lidja, kiu kaj en Eŭropo kaj en Usono studis, por povi instrui la lingvon laŭ la metodo de Andreo Ĉe. Bonŝance, nek Ludoviko, nek Klara devis poste suferi la novaĵon pri la murdo de la tri infanoj, Adamo, Felikso kaj Lidja en germanaj koncentrejoj, kiel viktimoj de la holokaŭsto.

En sia broŝuro “Esperanto-medaloj 1912-1955” nia honora membro Hans Jankowski povis montri kaj priskribi ne malpli ol **81 medalojn**, el kiuj **nur 2 (du!) kun bildo kaj nomo de iu esperantistino**. Hontu, samideanoj!!!

**Unu el ili** estas manfarita kopio de hispana medalo, atribuita al la memoro de Klara SILBERNIK (do, NE ZAMENHOF!), sur paĝo naŭ de la broŝuro.




Jen la priskribo:

"***En la kultura kadro de la Hispana Esperanto-Muzeo en San Pablo de Ordal oni decidis krei premion per kiu ĉiujare ekde 1975 estas premiata edzino de esperantisto kiu abnegacie helpis sian edzon en lia laboro por Esperanto.***

***La premio konsistas el arĝenta medalo, proksimume 40 mm de diametro kaj montras sur la averso la buston de la edzino de Zamenhof kaj skriboj: 'PREMIO KLARA SILBERNIK HONORE AL LA EDZINO DE ESPERANTISTO' / 'HISPANA ESPERANTO-MUZEO'.***

***Sur la reverso de la medalo estis skribita la nomo de la honorigata sinjorino kaj la jaro de la honorigo."***

Kompletigcele mi devas mencii, ke inter 1975 kaj 2002 ne malpli ol 27 medaloj kaj kelkaj atestoj estis eldonitaj kaj donacitaj okaze de tiu premio-projekto. Mirige estas por la redakcio de ENA, ke ni ĝis hodiaŭ en la reto ne trovis eĉ unu foton de tiu medalo!!!



Teresa Massana de Yzal ricevas la medalon Klara Silbernik (11-5-1975)




Speciala premioSilbernik por Teresa Massana de Yzal en 1993

# *T E R M I N A R O*

## Alfabeta listo (35)

***darkemono:*** *ora monero stampigita de Dario la Unua.*

***fantazia mono:*** *vidu>pseŭdmono.*

***frostigita dato:*** *jarindiko ĉe moneroj, uzata pli longtempe ol nur unu jaro kiel kutime. Ekzemple la nederlanda monerserio 1948 (ĝis 1950 restampita).*

***hibridaĵo:*** *ambaŭflanke de monero aŭ medalo estas erare uzata la sama stampo* **aŭ** *du diversaj stampoj estas uzataj por averso kaj reverso, sed laŭteme aŭ laŭevente ili ne kongruas.*

***intramono:*** *mono uzata nur en privataj rondoj, kie ĝi cirkulas kiel pagilo por kontribuoj aŭ dum komunaj eventoj. Ekzemple la iamaj spesmilo kaj stelo.*

***kunifero:*** *alojo konsistanta el kupro, nikelo kaj fero.*

***listelo:*** *plialtigita rando, uzata por efike stapli monerojn kaj medalojn kaj por protekti la monerfiguron.*

***malpatinigi:*** *forigi patinon per purigado kaj briligado.*

***monerumado:*** *iu monero estas turne ĵetata en la aeron kaj rekaptata tiel, ke ĝi montras unu el la du surfacoj. Ĉe tia lotumado gajnas la partio, kiu antaŭe elektis la montratan flankon.*

***mon-ofero:*** *oferaĵo pere de mono.*

***patinigi:*** *influi la surfacon per laborteknikoj kaj kemiaj substancoj.*

***patiniĝi:*** *la spontana proceso de oksidiĝo de metaloj aŭ aliaj substancoj (ligno, ŝtono…).*

***porokaza monero:*** *monero, eldonita por rememorigi partikularan okazon kaj enhavanta figuron diferencan, kun referenco al la okazo, pro kiu ĝi estas eldonita. Rarege ne nur kolektaĵo, sed ankaŭ uzata por regula cirkulado*

***pseŭdmono:*** *monaspekta objekto farata okaze de iu evento kiel memoraĵo, kiu ne cirkulas, do ne estas uzata kiel pagilo. Ankaŭ ludmono apartenas al tiu kategorio.*

***ŝraŭbpregilo:*** *aparato aŭ maŝino kiu pregas moneron aŭ medalon uzante ŝraŭban sistemon por premstampi en metalon.*

***zamako:*** *alojo de kvar metaloj. La nomo estas kunmetita el la komencliteroj de* ***z****inko,* ***a****luminio,* ***m****agnezio kaj* ***k****upro. Zinko reprezentas 90 % de la alojo; ĝi estas multe pli ĉipa ol kupro.*

# Rakonto pri tri duonkronoj

Vi kredeble scias, ke aperis traduko en Esperanton de la verko de Agatha Christie, titolita (en la angla originalo) *"The Murder of Roger Ackroyd"* kaj ke tiu traduko estas aĉetebla je la modesta prezo de **£10** ĉe EAB .

Vi eble ne scias, ke kiam la angla originalo eldoniĝis libroforme en 1926, la prezo estis sep **ŝilingoj kaj ses pencoj.** Do ĝi estis aĉetebla kontraŭ **tri** tiamaj **duonkronoj** (aŭ kombino de aliaj arĝent-enhavaj moneroj kun la sama suma nominala valoro).




De 1920 ĝis 1946 ĉiuj britaj "arĝentaj" moneroj stampiĝis en alojo, kiu entenis laŭpeze 50% da arĝento. Cetere ĉar en tiu epoko la pezo de entenata arĝento en la 'arĝentaj' moneroj estis proporcia kun la nominala valoro, tiel kiu ajn kombino de tiaj moneroj kun la sama suma nominala valoro entenis la saman kvanton da arĝento.

Estas kurioza kaj samtempe plaĉa ideo, ke se EAB akceptus pagon en malnovaj duon-arĝentaj moneroj, oni eble hodiaŭ povus aĉeti la esperantan version de tiu verko de Agatha Christie je la sama sumo, kiun oni estus paginta en 1926 por la angla originalo, eĉ uzante la samajn 1926-ajn monerojn.

Ni faru la kalkulon.

Tri duon-arĝentaj duonkronoj entenas 20 gramojn da arĝento (iomete pli, sed mi akceptus certan forfroton de la metalo pro cirkulado). La hodiaŭa prezo de arĝento estas £0,58 por gramo. Nu, 20 x £0,58 = **£11,60**. Pli ol sufiĉe por aĉeti la tradukon.

Mirinde, ĉar ĉiuj scias, ke mono perdis sian aĉetpovon dum la lastaj 100 jaroj (inflacio), ĉu ne?

Sed tio ne estas kaprompa mistero. Kiam monero havas esencan valoron, tiu valoro povas facile superi la nominalan valoron. Sed tio ne pruvas, ke arĝent-enhavaj moneroj povus plene protekti kontraŭ inflacio. Tamen mono, kiu **NE** havas enan valoron provizas nenian defendon kontraŭ perdo de la aĉetpovo.

Jen iom da monera historio.

En 1947 la duonkronoj (kiel ankaŭ la ceteraj "arĝentaj" moneroj) ĉesis enteni arĝenton; ili de tiam estis fabrikataj je la sama pezo, sed el kupro-nikelo. Tamen ankoraŭ ĉiujare stampiĝis duonkronoj (ĝis 1967), kaj tiu monero cirkulis kaj estis uzata por fari aĉetojn.

Poste, en 1971, la decimaligo de la brita mono devigis la britojn relerni por ĉiu varo la modernan ekvivalentan prezon en novaj pencoj. (Similan maloportunon spertis la kontinentanoj post la eŭrigo de la franko, marko, liro ktp.)

Tiel 7ŝ kaj 6d fariĝis 37 novaj pencoj (mi rondigas) aŭ £0,37. Do pagante la verkon per modernaj moneroj, oni spertus **27-oble** (£10/£0,37) la koston kompare kun pago per malnovaj moneroj.

Estis epoko tamen, kiam la brita pundo estis "**honesta**" mono. Antaŭ la unua mondmilito la brita suvereno, tiel nomiĝas la tiutempa or-enhava punda monero, entenis ĝuste la kvanton de tiu metalo, kiu egalvaloris unu pundon.

Ĉu la spesmilo (nia esperanta, orbazita mono) estis ankaŭ honesta mono? Iuj diros, ke la demando estas sensenca, ĉar la spesmilo neniam estis reala mono, kaj cetere neniam ekzistis or-enhavaj spesmilaj moneroj, (**noto de la redakcio**: ***escepte de la speciala, malaperinta 50spesmila-monero kiun Zamenhof ricevis en 1912!)***.Nu, ĝis kiu grado en la historio E-organizaĵoj uzis la spesmilon por prezumi siajn varojn kaj servojn kaj akceptis pagon en spesmiloj, pli bone ol mi povas diri spertuloj pri la fruaj jaroj de la movado?

Sed mi tute ne akceptas, ke hodiaŭ efektive ne ekzistas spesmilaj moneroj. Por preni unu ekzemplon de mia lando, la 2023-suvereno (kaj same tiel ekde 1817) estas stampita el 7,988 gramoj da 22 karata oro. Do ĝi estas **preskaŭ ekzakte 10-spesmila monero**. (Laŭ difino 10 spesmiloj enhavas 8 gramojn da 22-karata oro).


ora duonsuvereno


ora suvereno

Kompreneble ĉiuj or-enhavaj moneroj havas kalkuleblan kaj fiksan valoron en spesmiloj; fiksan en spesmiloj, ĉar ĝi venas de la pezo de entenata oro, ne de la prezo de oro en konvencia valuto. Sed, kio eble esceptigas la britan suverenon, estas ke tiu monero ne havas surstampitan nominalan valoron kaj ĝi havas rondciferan ekvivalenton en spesmiloj.

Tamen la suvereno apenaŭ estas praktika monero por pagoj (nek la duonsuvereno) pro ĝia alta valoro. Libro, kiu kostas hodiaŭ £10 eĉ ne atingas unu spesmilon (£10 ekvivalentas al nur 284 spesoj je la aktuala or-prezo en pundoj).

Sed, kompreneble, la suvereno tute taŭgas por stapli viajn ŝparaĵojn, kiel ĉiuj aliaj or-enhavaj moneroj, kiuj aĉeteblas je prezo ne multe pli alta ol la esenca valoro de la konsistiga metalo.

Ni turnu nin al la demando, kiom en 1926 kostus la verko de s-rino Christie, se tiam kalkulita en spesoj, kaj kiel tio kompariĝus kun la hodiaŭa prezo de la traduko, se nuntempe kalkulita en spesoj.

Nu, en 1926 la or-arĝenta rilato estis, ke oni bezonis 40 gramojn da arĝento por aĉeti unu gramon da oro. Tri duon-kronoj de tiu jaro (freŝ-stampitaj) enhavis sume 21,18 gramojn da arĝento, kiu estus aĉetinta 21,18/40 = 0,5295 gramojn da pura oro. Kalkulante la 1926an prezon de la originalo en spesmiloj, oni ricevas 0,5295/0,7333 = 0,722 Sm = 722 spesoj !

Kia brila mono estas la spesmilo! En kiu alia valuto la traduko kostus hodiaŭ malpli ol la originalo? Mi lasas la leganton mem kalkuli. Mi vetas, ke li ne sukcesus trovi alian kandidaton.

Cetere, se vi supozas, ke iel mi trompis per kaŝita miskalkulo, aŭ per miscito, kontrolu mem! Sciu, ke la pur-ora enhavo de unu spesmilo estas 0,7333 gramoj, la malneta pezo de 1926a duonkrono estis 14.125 gramoj (el kiuj nur 50% estis arĝento) kaj la or-arĝentan valor-rilaton en 1926 vi povas konfirmi serĉante en la reto.

Estas al vi decidi, ĉu vi daŭre restigos viajn ŝparaĵojn en kanajla/trompa papera mono aŭ ĉu vi konvertos en spesmilojn. Mi rekomendus, ke vi investu en suverenojn, kiuj ĉiujare stampiĝas kaj kiuj estas akireblaj je prezo ne multe pli ol la valoro de la entenata oro. Sed se estos pli facile por vi aĉeti alian or-enhavan moneron, zorgu, ke vi ne neniam pagu numismatikan plus-koston.

Se tio estas tro por via poŝo, tiam almenaŭ akumulu arĝent-enhavajn monerojn, same ne pagante pli ol la valoron de la entenata metalo. Cetera konsilo: esploru ĉe viaj parencoj, ĉu ili havas konservitajn malnovajn arĝentajn monerojn de la epokoj, kiam moneroj estis pli honesta mono. Eble vi povus persvadi ilin donaci…

Terry Watts

***La redakcio de ENA dankas s-ron Watts, kiu estas tre regula, nemalhavebla kunlaboranto de nia revuo.***




# Esperanta mono – Spesmilo kaj Stelo

En 1907 universitata profesoro **René de Saussure** prezentis projekton de universala monsistemo, kiun li nomis **"Spesmilo".**

Unu spesmilo = 10 spescentoj = 100 spesdekoj = 1000 spesoj. La Spesmiloj oficiale uziĝis ĉe kelkaj britaj kaj svisaj bankoj. Poste fondiĝis Ĉekbanko Esperantista.

La valoro de unu spesmilo estis la sama kiel 0,733 g de pura oro.

Ekde la malfondo de la Ĉekbanko Esperantista en la jaro 1918 la spesmilaj moneroj havas nur numismatikan valoron.



*Stelo-monero de 1965.*

**1942** fondiĝis Universala Ligo de Nederlando, kiu aktivis por universala monsistemo, nomis „Spesmilo". El la franca vorto „espèce" [espés] li formis la vorton „speso".





*Du spesmilaj moneroj kaj karikaturo, kiu montras René de Saussure dum la produktado de vortoj.*

la **"stelo".** La unuaj moneroj – unu, kvin kaj dek steloj, pretiĝis en **1960** kun la jarindiko.

**2012 eldoniĝis plastaj steloj** en Belgio. Ili havas la nominalojn unu, tri kaj dek steloj.



*Plastaj steloj de 2012.*

La eldonkvanto estas po 3000. Ili uziĝas dum junularaj Esperanto-kongresoj.

**La arĝenta speciala monero** 100 steloj en 2018. Ili ankaŭ fariĝis medalo okaze de la naskiĝdat-reveno de René de Saussure la7an de marto 2018.

Li estis la inventinto de universala mono.




**Mag. Walter Klag,** Vieno, Eŭropa Unio,
(esperanto @chello.at)

**La redakcio dankas nian membron Josef Kříž, kiu prezentis la revuon "Ora Ĵurnalo" k. la artikolon.**

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

# Reagoj kaj konversacioj

*07.07.2023 10:48*

*Kara Jozefo,*

*Jen mi denove! Ĉiam estas agrable povi konstati ke nova numero estas kompleta. Tamen por vi estas signo, ke mi denove bezonas vian specialan atenton. Do jen mia peto provlegi la antaŭlastan numeron de la deka jarkolekto, sendita per wetransfer.*

*Mi, kiel kutime, tutkore antaŭdankas vin kaj salutas vin kaj vian familion.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

13.07.2023 16:59

Kara Bert,

mi sendas same per Wetransfer la ENA-revuon kun miaj sugestoj.

Min tre interesas historio, tial kun pli da atento mi legis la artikolon, priskribantan la belegan medalon pri la sieĝo de Rejselo. Mi faris kelkajn korektojn en la latina teksto. Ekz. Insulae (Insuloj) estas la latina nomo de Rejselo. *Unita virtus valet* estis devizo de ankaŭ iu transilvania duko sur lia blazono. Eŭgeno de Savojo rolis tre pozitivan rolon ankaŭ en la hungara historio dum la kontraŭturkaj rekonkeraj militoj. Mi devas konstati refoje, ke la mondo tamen ne estas tro granda, almenaŭ en la eŭropa kulturo.

Kun amikaj salutoj: Jozefo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.07.2023 10:00

Kara Bert. elkore mi dankas vin pro la sendita ENA-revuo. Ĝi enhavas multajn medalojn, kiuj tre plaĉas al mi. En mia kolekto estas el ili nur tiu de la ĉeĥa artisto Jiří Harcuba, La aŭtoron mi ekkonis persone dum la komuna esperanta aranĝo kune kun ĉeĥaj kaj saksaj esperantistoj ĉk. meze de la 90aj jaroj. Profesoro Harcuba (1928-2012) estis ankaŭ esperantisto. Post nia renkontiĝo li sendis al mi medalon kun portreto de la docento Jaroslav Skála (ĉeĥa adiktologo), kiu fondis la unuan kontraŭalkoholan kuraclokon (klinikon) en Prago kaj atingis en tiu ĉi fako multajn sukcesojn. Dum la jaroj 1992-1994 li estis rektoro de praga Akademio de Arto.

Plaĉas al mi la medalo kun Andreo Czeh, kies pragepatroj devenas el la urbo Bohdaneĉ (la banurbo) - 12 km de nia loĝloko.





Plue - mi posedas medalon de finna esperantisto Vilho Setälä - kies fotojn kaj bildojn de la medalo mi sendas almetite al vi. Li estis ĵurnalisto, fotisto, esploristo, verkisto (aŭtoro de literaturo de fakto) kaj multflanka kultura aktivisto. Li estis unu el la pioniroj de finna fotografia arto. Pli da informoj estas en reto sub la slogano Vilha Setälä.

Amike salutas vin Josef Kříž (Kruco)

*17.07.2023 12:39*

*Kara Josef!*

*Multan dankon pro via malkonciza reago kun interesaj informoj. Ĝi estos publikigata en la rubriko Retpoŝto.*

*Amike,*

*Bert*

17.07.2023 12:49

Saluton, Bert, ... se vi intencas publikigi mian kontribuaĵon, estus bone, ke mi klarigu (precizigu) mian frazon en la teksto: *Dum la jaroj 1992-1994 Jiří Harcuba estis rektoro de praga Akademio de Arto*. ... ke la legantoj komprenu, ke en posteno de la rektoro ne estis docento Skála mem.

Amike - Josef

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.07.2023 13:23

Dankon kaj gratulon, kara Bert!

Multsalute

Ludoviko kaj Julinjo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*14.07.2023 18:12*

*Karaj legantoj,*

*Hodiaŭ vi ricevos la antaŭlastan numeron de la deka jarkolekto de la ENA-revuo. Kiel kutime la redakcio deziras al vi ĉiuj multan plezuron kaj agrablan legadon. Vi jam scias, ke ni estos agrable surprizotaj povi ricevi viajn reagojn aŭ rimarkojn. Multe da plezuro!*

*Bert Boon*

19.07.2023 11:31

Dankon,

mi disvastigas la revuon.

Amike

Maria Niemyjska

*19.07.2023 13:34*

*Koran dankon, Maria!*

*Ĉu lastatempe en via nacia aŭ loka movadoj estis eldonitaj novaj esperantaj medaloj?*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.07.2023 11:26

Kara Bert,


elkoran dankon pro la nova numero de ENA-revuo!

Saluton el Kroatio!

Velmir Piškorec

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.08.2023 11:43



ONGE

Movado

Nia mono. Aperis en Germanio 34-paĝa broŝuro de H. Jankowski, kun klarigoj kaj ilustrajoj pri "Esperanto-mono, historio pri universala mon-sistemo" (spesmila banko, moneroj de Universala Ligo, ktp.). *(M/LG)*

Herman Deceuninck

*02.10.2023 11:06*

*Kara Herman!*

*Multan dankon!.Mi aktuale kompilas por la nova numero la rubrikon "Retpoŝte". Ĉu vi ankoraŭ scias la fonton de tiu artikolo pri Jankowski?*

*Elkoran antaŭdankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

03.10.2023 11:04

Kara,

Mi ne plu bone memoras kiun mi sendis al vi, sed la informo venas el HdE 1/7/94

Mi vizitis la arkivon IEA ĉe Marc Vanden Bempt, impona, ĉu?

Herman

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.08.2023 10:27

Kara Bert,

dankon pro via viziteto rilate E-bibliotekeblecoj en Herzberg.

1) Siatempe estis samideano Martin Ptasinski, kiu petis membriĝi ĉe ENA.

La adreson vi trovas supre.

2) La interesan historian artikolon vi sendis rilate al urbo Gotha. Tio estas konata

Esperanto-historiaĵo.

La Otto Dix-muzeo troviĝas **ne en Gotha**, sed en Gera (Orienta parto de Turingio).

Zsofia ferias ĉe la filinio ĉe Balatono.

Havu agrablan restsomeron.

Amike salutas

Petro
Esperanto-Centro, 37412 Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo

20.08.2023 12:17

Saluton Bert!

Fine ni povas kontaktiĝi. Mi siatempe perdis vian nomkarton, kaj poste vojaĝis al Hispanio. Reveninte al Germanio mi havis neatenditan "streĉon" pro (bona, sed surpriza) laboroferto en Leipzig kaj plue devis vojaĝi al Luzacio en julio por instrui tie la soraban dum somera kurso.... mi volis kontakti la Esperanto-centron por peti vian adreson, sed vi estis pli rapida :)

Mi ja diris ke mi ŝatus membriĝi en ENA, kaj tion mi daŭre volas. Nur diru al mi, kion mi devas fari por tio (aliĝo, membriĝformularo, ks.).

Amike,

Martin

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.09.2023 13:18

Jen fotoj de viaj du medaloj.
Ne forgesu ke ili kuŝas ĉi tie!
Marc Vanden Bempt




*20.09 2023 14:50:08*

*Kara samideanino,*

*Multan dankon pro la medaloj kiujn havigos al mi Marc Van den Bempt kaj same danke pro la adreso de s-ro Kochvara!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert Boon*

20.09.2023 19:11

Kara samideano,

mi esperas, ke la medaloj plaĉos al vi. Se vi veturos al Ĉeĥio, certe vizitu nian muzeon.

Amike Libuše Dvořáková el Svitavy

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

29.08.2023   21:53

Kara Bert,

dankon pro viaj reagoj.

Dankon pro via belaj fakgazetoj!

Foje ni jam respondis viajn demandojn.

Rilate al Otto Dix vi intermiksis la lokojn, ĉar Otto Dix ne rilatas al Gotha,

sed al GERA!

Havu agrablan restsomeron.

Sanon kaj feliĉon por vi.

Amike salutas

Petro kaj Zsofia

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.10.2023   13:55

Saluton, Albert Boon!

**La 100-jara Memorevento de la Fondiĝo de EPA** (Esperanto-Populariga Asocio) de la 15-a ĝis la 18-a de septembro

Kun ĝojo kaj plezuro, ni, la skipanoj de Esperanto-fako de Legio de Bona Volo (LBV), diskonigas gravan eventon en Japanio celebre al la 100-jara Jubileo de la Fondiĝo de **EPA (Esperanto-Populariga Asocio)**. Tiun organizon fondis la ŝintoisma komunumo **Oomoto** en 1923.

Plej fratamike,

Maria Aparecida da Silva

www.paivanetto.com/eo          www.religiodedio.org

*12.09.2023   13:24*

*Saluton Kara Maria!*

*Bonvolu saluti kaj gratuli la samideanojn de EPA. Kia grandioza memorevento!*

*Ĉu la asocio dum tiu epoko iam eldonis memor - aŭ alispecan Esperanto-***medalon***? Se jes, ĉiu el ili meritas lokon en la preparonta unua katalogo.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert Boon*
*Iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio*

05.10.2023   13:55

Estimata Samideano Bert Boon

Koran Saluton!

Mi pardonpetas pro tiu ĉi malfrua respondo, ĉar mi hastas pro multe da laboro. Unue mi esprimas nian dankon al Vi pro tiu simpatia kontakto.

Pri via demando koncerne al eldono de medalo omaĝe al la 100-jariĝo de la Esperanto-Popularigo Asocio (EPA), mi fakte ne havas scion pri la afero.

Mi sugestas, ke Vi perrete kontaktu la direktoron de EPA, s-ro **AGO Takaŝi** per tiuj retadresoj:

oficejo@epa.jp

t-ago@oomoto.jp

Kun niaj fratecaj brakumoj,

plej amike,

Ma. Aparecida

www.paivanetto.com/eo

*05.10.2023 17:18*

*Estimataj samideanoj,*

*Permesu peti al vi, legi la korespondadon de ENA kaj Bona Volo kaj respondi, se eble.*

*Mi antaŭdankas vin kore,*

*Mag.Fil. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.10.2023 13:19

Mi konstatis ke mi nenion aŭdis de vi dum sufiĉa longa tempo, kaj mi min demandis ĉu vi ankoraŭ bonstatas.

Mi ne ricevis ligilon por la numero de la numismatika gazeto en kiu aperis mia kvizo pri la spesmilo (eble vi sendis kaj mia retpoŝta programo forviŝis ĝin antaŭ ol mi ekvidis).

Same mi ne vidis agnoskon de la artikolo *Rakonto pri 3 duonkronoj* . Laŭ mia memoro mi sendis tion en julio.

Samideane,

Terry

*08.10.2023 18:20*

*Saluton kara Terry,*

*Vi certe pravas, ke inter ni estis sufiĉe longtempa silento. Tion kaŭzis la fakto, ke inter du numeroj de la revuo estas preskaŭ tri monatoj kaj foje novaj artikoloj kiuj jam rezerve ricevis provizoran lokon por venontaj novaj numeroj. Nu, en la kvara numero de la aktuala jarkolekto, fine de oktobro, aperos la du de vi senditaj artikoloj pro kiuj mi dankas vin tutkore. Krome, en la unua numero de la fino de januaro 2024 ankaŭ aperos la solvoj de la kvizo!*

*Do, mi certe bonfartas malgraŭ miaj 75 jaroj, kaj mi esperas same por vi kaj via familio!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**A N O N C O J**

**&**

**E V E N T O J**

# Vikingaj trezoroj en Jutlando (Danio)



En la nord-okcidenta parto de Danio antaŭ nelonge estis elfosita tre multvalora vikinga trezoro, i.a. aro de pli ol 3000 arĝentaj moneroj.



Fyrkat

La trovitaĵo elmergiĝas en maiza kampo en la ĉirkaŭaĵo de Bramslev, nur preskaŭ ok kilometrojn de la normana fortikaĵo Fyrkat. Amatoro kun metaldetektilo estis la bonŝanca trovinto.

Krom moneroj li trovis ankaŭ diversajn arĝentajn juvelojn. Tamen la aro estas miksaĵo de du diversaj trezoroj kun interspaco de kvindek metroj. Laŭ ekspertoj ili datas el la jaro 980 de nia erao, kiam ankaŭ la fortikaĵo Fyrkat estis konstruita.

Inter la moneroj estas danaj, arabaj kaj germanaj ekzempleroj, kio montras, ke la tiamaj vikingoj havis sufiĉe larĝajn komercajn kaj surprizatakajn retaĵojn.

Parte, la valoreco de tiuj elfositaĵoj estas interligita kun la fakto, ke ĝi estas la pli grava kaj pli granda trezoro de pli ol kvindek jaroj.

Ke la trezoro estas miksaĵo tre verŝajne kaŭzis ripetitaj plugadoj de la kampoj, tiel ke la objektoj estis disvastigitaj en pli grandan areon.Tial la arkeologoj ne certe scias kie la diversaj artefaktoj havis sian originan lokon. Koncerne la juvelojn, la fakuloj de la Historia Muzeo de Nord-Jutlando miris pri du belegaj, arĝentaj buloj. Ili supozas, ke tiuj objektoj iam estis partoj de arĝenta ringfibulo. La kvalito kaj la mezuroj pensigas, ke ĝin eble iam posedis episkopo aŭ reĝo, kaj ke ĝi estis probable ŝtelita dum surprizatako ie eksterlande.


Reĝo Harald

Koncerne la 300 monerojn, kelkaj danaj ekzempleroj ricevis specialan atenton de la arkeologoj. Ili estas konataj kiel "krucmoneroj" el la epoko de reĝo Harald Blåtand (= blua dento) el la jaroj 970-980. Unuflanke videblas kruco. Tia kruco ne jam ekzistis sur moneroj el la antaŭa epoko. Oni do supozas, ke ili estis kvazaŭ reklamiloj por anonci la konvertiĝon de Harald al la kristanismo. Alia konekto povus esti la monolito de Jelling, starigita ĉirkaŭ la jaro 965. Tiaj monolitoj, troviĝantaj sur la tombejo de Jelling estas ornamitaj per runskribaĵoj. Ili datas el la 10a jarcento kaj estis starigitaj de la unuaj danaj reĝoj, inter ili ankaŭ Harald. La probable reklama funkcio de la danaj moneroj igas ilin historie ege interesaj.

Kiel jam dirite, la trezoroj troviĝas en la najbareco de la fortikaĵo, kiu estis konstruita ĉirkaŭ 980 kaj post mallonga tempo forlasita. En tiu historia epoko estis kutimo enfosi valoraĵojn pro milito aŭ politika krizo. Eble eĉ okazis batalo pro la reĝeco.

La trezoroj troviĝas en la tiel nomata muzeo "Nordjysker Museer".


Krucmonero de Harald


Monolito de Jelling


Fonto: wikipedia

Kara Bert!

La spesmilo (kun tri aliaj objektoj) vendiĝis kontraŭ 275 € , la 25 steloj kostis 60 €.

Elkoran saluton!

Walter Klag



**Bids Placed in Current Auctions**

▼ **Ranieri Online Auction 15** (4 Jul 2023)

Currency for this auction: **EUR**

| | Lot | Description | Starting price | Your Maximum Bid | Accepted by the Auction Firm? | Price Realized |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | 130 | LOTTI Lotto composto da 2 spillette di epoca fascista 1... | 50 | 80 | Yes | 275 |
| The above bid has been surpassed by a later bid | | | | | | |
| | 130 | LOTTI Lotto composto da 2 spillette di epoca fascista 1... | 50 | 100 | Yes | 275 |
| The above bid has been surpassed by a later bid | | | | | | |
| | 130 | LOTTI Lotto composto da 2 spillette di epoca fascista 1... | 50 | 150 | Yes | 275 |

▼ **ACM Aste E-Live Auction 29** (3 Jul 2023)

Currency for this auction: **EUR**

| | Lot | Description | Starting price | Your Maximum Bid | Accepted by the Auction Firm? | Price Realized |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | 235 | Monete Estere. Esperanto. 25 Steloj 1965. Ag. KM# 6. Peso... | 30 | 60 | Yes | 60 |



18.08.2023 on eBay



1910 Esperanto Medal 6A Internacia Kongreso De Washington 14-20 August 1910

**US $75,00** + US $15,75 takso

# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.
La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol naŭ jaroj ĝis 165 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
bert.boon@skynet.be